

Babilada Rondo

... okazas je la 19-a.

Aliĝu rekte ĉe la gastiganto mem.

Vendrede, la 18-an de marto
... ĉe Charlotte (021 922 34 74)

Vendrede, la 15-an de aprilo
... ĉe Francisko

Vendrede, la 13-an de majo
... ĉe Gilbert

Vendrede, la 27-an de majo
... ĉe Cléa

Vendrede, la 10-an de junio
... ĉe Sonia

Vendrede, la 1-an de julio
... ĉe Christiane



Propagando en la bazar

okazos inter la 9-a kaj la 12-a ...

Sabate, la 16-an de aprilo
...en Laŭzano

Sabate, la 21-an de majo
...en Belmont

Sabate, la 4-an de junio
...en Laŭzano

Sabate, la 16-an de julio
...en Laŭzano

Sabate, la 24-an de septembro
...en Laŭzano

Sabate, la 22-an de oktobro
...en Laŭzano



Laŭzana Esperanto - Societo

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63

Sekr.: Francisko Randin * 076 411 14 55 - Kasisto.: Sonia Daubercies * 079 649 88 86

Laŭzana Esperanto - Societo

Informilo

Marto 2011 - no 03

Lunde la 7-an de marto 2011, je la 20-a
ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo
Mirejo Grosjean, svisa kunprezidanto,
parolos al ni pri UNO

Lunde la 4-an de aprilo:

*Venu kun viaj demandoj, lingvaj problemoj ... ni provos respondi al vi.
Venu kun viaj malkovraĵoj, lingvaj kuriozaĵoj ... vi prezentos ilin al ni.*

Lunde la 2-an de majo:

Christiane Andreae parolos al ni pri la UK 2010 en Kubo

Sabate la 18-an de junio:

Ekskurso

Lunde la 5-an de septembro:

Decidota

Lunde la 3-an de oktobro:

Decidota

Lunde la 7-an de novembro:

Decidota

Sabate la 17-an de decembro:

Zamenhofa Festo

2012

Lunde la 9-an de januaro:

Decidota

La viro por ŝi

Dua kaj lasta parto

de Claude Piron, el *Vere aŭ fantazie*

"Tio dependus de lia personeco, de lia maniero postuli. Kelkfoje postulemo devigas onin pliboniĝi."

"Viaj pensoj estas strangaj, fojfoje," ŝi diris kun miro, kun kiu miksiĝis iom da malestimo. "Por mi, tio estas neakceptebla; fino; fina punkto. Jen vi nun scias la kaŭzon, pro kiu ni disiĝis. Ne estis eble daŭrigi."

Kiam ili revenis la postan semajnon okazis io stranga al Ivano. Kiel kutime, li troviĝis je sia loko, de kie li superrigardis la kafejon, atendante la mendojn. Sed ĉi-foje, la du junulinoj ne povis havi la kutiman tablon, ĉar iu jam sidis tie. Kaj anstataŭ vidi ilin de malantaŭe, kiel kutime, Ivano vidis ilin rekte antaŭ si. Neniam antaŭe li vere rimarkis, kiel bela ŝi estas.

Dum li rigardis ŝin, lia koro batis pli kaj pli rapide. Sentoj turniĝis en li, strangaj sentoj, kiajn li antaŭe neniam spertis. Li deziris esti kun ŝi. Li deziris teni ŝin en siaj brakoj, premi ŝin forte al si, tuŝi ŝin per amoplenaj manoj. Amplenaj, ĉu? Jes, li ekkomprenis, preskaŭ terure: li amas.

Kaj jen li ekridetis al si. Li aŭdis ŝin tiel ofte! Li sciis tre ĝuste, kian viron ŝi deziras. Li estos tia viro. Estos facile, konante tiel bone ŝiajn gustojn. Li skribis kelkajn vortojn sur papero, kiun li transdonis al ŝi. Tia agmaniero kaŭzos en ŝi miron, kiu certe tuŝos ŝian koron. Estis invito vespermanĝi kun li.

"Ivano ne plu laboras ĉi tie, ĉu?"

"Ne. Kiam mi forsendis lin, dirante, ke li ne estas viro taŭga por mi, li sciis, ke ne plu estus eble vidi min ĉi tie ĉiusemajne. Mi komprenigis al li, ke mi ne ŝanĝos mian kutimon kaftrinki ĉi-loke kun vi, nur pro tio, ke li kaj mi dum kelka tempo estis kune. Li do serĉis ion alian. Li nun laboras en la stacidoma trinkejo."

"Jen plia knabo, kiu ne sukcesis kontentigi vin!"

"Kiel Ivano povus? Kelkfoje li provis ludi la estron. Li alprenis ordonajn sintenojn, volis ĉion direkti. Li aspektis forta en tiaj okazoj, sed kun forteco malagrabra por mi, ĉar li sentigis al mi ian superecon. Sed tion li rimarkis, kaj tiam li iĝis mola kiel printempa floro en vespero somera. Li faris ĉion, kion mi volis, li montriĝis tiel ama plaĉi al mi, ke nenio plu restis el lia bela vira supereco. Tiu knabo estas tro ŝanĝiĝema. Mi bezonas iun, kiu konstante restas si mem. Mi neniam povus kutimi vivi kun tia ulo."

"Kaj jen vi retroviĝas sola, ĉu ne terure?"

"Terure jes. Mi ne elportas solecon. Tiom pli terure estas, ĉar ĉiuj miaj amikinoj havas knabon, kun kiu ili sentas sin bone. Kial tiu feliĉo neniam okazas al mi? Vere mi ne komprenas. Kial mi devas ĉiam retroviĝi sola, sola, sola, dum mi tiom bezonas iun?"

La alia nenion diris. Ŝi konis sian amikinson sufiĉe bone por scii, ke tiu ne estis preta akcepti la veron pri si.

'Ŝi ne akceptas la Teron', ŝi pensis, 'ŝi ne akceptas la vivon sur ĉi tiu nia Tero, en ĉi tiu nia mondo. Ŝi ne akceptas la regulojn de la vivo. Oni povas kontentiĝi nur, se oni deziras ion, kio estas ebla. Kaj ĉio, kio estas ebla, sur ĉi tiu Tero, estas mankohava.

Kiel ŝi povas tion ne vidi? Ĉu eble la vivo estis tro facila por ŝi? Aŭ tro malfacila? Sed ŝi neniam sentas sin bone, ĉiam dezirante, kion ŝi ne elportas, kaj ne elportante, kion ŝi deziras. Ĉu sian kontraŭdiron ŝi iutage vidos? Ĉu tio igos ŝin ŝanĝi sian sintenon?'

La rigardo, kiun ŝi direktis al sia samtablulino, estis plena je amikeco. Sed en la kunulinaj okuloj legiĝis responde nur malestimo, pliafoje.

Senvorte ŝi ekstaris, kaj iris for.